marzo


# AVANCO

1/2001

Marto (XII-a jaro, Nro. 2)

Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio


# 18-a Nacia Komitatkunsido de KEA



## Estimataj:

Unue mi devas pardonpeti, pro la fuŝaĵoj aperintaj en la lasta numero de Avanco. Hasto kaj tro da malfrunokta laboro (pri la bulteno, kompreneble...) kulpas, sed mi respondecas.

Mi ĝojas anonci al Vi, ke jam ni finfine kontraktis la presadon de nia bulteno, do la apero de Avanco ree reguliĝos.

Plia novaĵo estas, ke de nun Avanco aperigos la informojn pri la Nacia Komitatkunsido kiel kroman numeron. Do, estos entute kvar numeroj en la jaro. Kaj jen la unua el ili, ĉi-kaze pri la «katara» Komitatkunsido, ĉar la plimulto el la komitatanoj suferis pri kataro...

Kaj jen freŝa novaĵo, ankoraŭ gutanta elektronojn, ĉar ni ricevis ĝin per Interreto: oni ĵus elektis bonegan amikon de Kubo, S-ro Eddy Raats, Prezidanton de Flandra Esperanto-Ligo. Gratulojn!

Via Redaktoro,
Lic. Alberto García Fumero

AGFumero

## NACIA ESTRARO

***Maritza Gutiérrez González**
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.

***Juan Ramón Rodríguez Gómez**
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas internan agadon./Historio, Ameriko, **Avanco**, **La Noktuo** kaj **Universo**

***Martha Alonso Gutiérrez**
Financoj./Resp pri administraj aferoj

***Alberto García Fumero**
Informado./Hejmpaĝ

***Pedro Fernández Rodríguez**
Kulturo. Zorgas pri artaj k. klerigaj aranĝoj./Biblioteko

***Héctor Jiménez Batista**
Instruado k. ILEI-Sekcio.

***Manuel Rodríguez Rábago**
Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj.

Komisiitoj
*Roberto Torres Alvarez
Atento al alilandaj e-istoj.
*Juan Lázaro Besada Toledo
Atento al verkistoj.
*Carmen A. Hernández Socarrás
Faka Agado

**XII-a jaro, nro.3 1/2001, (speciala). Aperas 4- foje jare (mar., jun., sep. kaj dec.) / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 401364 kaj 404484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@ip.etecsa.cu / Ĉefredaktoro: Alberto García Fumero / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Komputila kaj grafika aranĝo: Alberto García Fumero / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u /** **Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).**

## ENKONDUKO

Sub la signo de novaj jarcento kaj jarmilo, la Komitato de Kuba Esperanto-Asocio denove kunsidas, por plenumi sian jaran renkontiĝon, ĉi foje en la urbo Santa Clara. Kiel estas jam tradicio, ni celas raporti al vi koncize, sed kiel eble plej amplekse, pri la laboro plenumita de la Nacia Estraro kaj de la diversaj filioj tra la tuta insulo dum la jaro 2000, kiu certe estis plena je defioj, taskoj, mankoj kaj revoj, kiel ofte okazas ene de familioj, tiel nuancoriĉaj kiel ni ja estas kaj klopodas daŭre esti.

Ni alvenas al tiu ĉi Komitatkunsido konsciaj pri tio, ke la rezultoj povintus esti pli bonaj, se ni ne devintus alfronti tiom da problemoj kiuj fontis el ni mem, sed ni ja estas kontentaj pri tio, ke ni multon lernis pri nia rondo familia kaj esperas ke, per tia sperto, ni sukcesu pli kaj pli alfronti estontajn taskojn tra la tuta lando. Bedaŭrinde, kelkaj filioj perdis koherecon en sia organiza laboro, dum aliaj sukcesis stabile funkcii; la membronombro multe variis en kelkaj regionoj kaj ankoraŭ la esperanta klerigo de nia membraro bezonas pli da laboro konstanta.

Tamen, ankaŭ menciindas sukcesaj momentoj, kiaj la evento SAEST, Nacia Seminario por Instruistoj, Infana Festivalo en Guantànamo, Nacia Renkontiĝo en Urbo Havano, Instrua Seminario en Camagüey kaj Renkontiĝo Nacia en Baracoa. Multaj revoj ankoraŭ nin impulsas kaj devas ĉiam puŝi nin al iniciatemo, entuziasmo kaj aktivado.

Ni plenumu nian hodiaŭan taskon kun la celo tiri novajn spertojn, kiuj kontribuos al pli efika laboro por la nova periodo. Ni ne devas forgesi ke nia celo estas teni viva la e-istan torĉon en la insulo ĉi-jarcente tiel, ke niaj posteuloj heredu la planton, kiun iam aliaj semis en nia lando, sed planto sana kaj verda, viva kaj plena je floroj, kies aromo incitu novajn homojn al sinoferoj kaj plia laboro, por ke la rondo familia daŭre estu realo en tiu ĉi kariba insulo.

### 1. Informado

La jaro 2000 estis markita de la 21-a datreveno de nia asocia ekzisto kaj tiel estiĝis diversaj planoj kiuj fruktedonis pere de rimarkinda informa laboro, ĉefe dum la unua semestro. Ĉirkaŭ la datreveno, meze de la jaro, ni sukcesis allogi la nacian publikon per la nacia kaj provincaj televidoj, kaj per kelkaj radiostacioj.

***1.1. Regula informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA, pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj, kaj per aliaj rimedoj, kun emfazo en la grafikaj, tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciiĝu pri nia agado.*** La regula informado estis ja kontentiga pro la menciitaj kialoj. Oni entreprenis diversajn demarŝojn rilate propagandon per diversaj amasmedioj: radio, ĵurnaloj kaj televido kun la valora helpo de Alejandro García, kio alportis kontentigajn rezultojn. Regula informado efektiviĝis per naciaj kaj lokaj radiostacioj: *Progreso*, *Rebelde*, *Reloj*, *Havano-Kubo* (krom la dimanĉaj programoj, oni faris kaj diskonigis kelkajn intervjuojn kaj specialajn programojn, kiel ***Indagaciones***), *CMHW* (Villa Clara), *Sancti Spíritus*, *Surco* (Ciego de Avila), *Cadena Agramonte* (Camagüey), *Angulo* (Holguín), *Bayamo* (Granma), *CMKC* (Santiago), ktp. En la nacia televido oni parolis dufoje pri E-o en la programo ***TeVeré*** kaj kelkfoje en regionaj kanaloj. Aldone, la informa agado per retmesaĝoj estis aparte vigla dum la jaro flanke de la koncerna estrarano, kiu dissendis al la plej gravaj E-informcentroj ĉiujn plej gravajn noticojn pri la agado de la Asocio dum la jaro.

***1.2. Konsciigi la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E-o en sia medio por varbi novajn membrojn kaj amikojn de E-o.*** Grava parto de tiu ĉi agado estis farita en la diversaj aranĝoj pere de temaj analizoj, prelegoj kaj aliaj. Tiurilate, ni devas pli kaj pli emfazi, tiel ke niaj homoj ricevu jen en la aranĝoj, jen en la klasoĉambroj regulan informadon pri tiklaj temoj rilate al la lingvo kaj al la evoluo de la nacia kaj internacia E-komunumo.

***1.3. Garantii la eldonon de* Avanco *(3-foje jare),* La Noktuo *(4-foje),* Universo *(6-foje) kaj aliaj bultenoj kaj ties distribuon al enlandaj kaj eksterlandaj amaskomunikiloj kaj institucioj.*** Rilate la asociajn organojn, la realo estis preskaŭ kaosa: kvankam ni sukcesis pretigi la tri planitajn eldonnumerojn de **Avanco**, oni nur presis la unuan el ili, pro malfavora reago de la presejo (la dua eldono restas tie ekde septembro kaj la tria ankoraŭ atendas sian vicon). Rilate al **La Noktuo**, nur aperis du numeroj je la fino de la jaro dank' al helpo de la estrarano pri Kulturo. Dum la jaro **Universo** restis silenta, malgraŭ kelkaj promesoj de ĝia redaktoro. Same okazis pri **Saĝa sago**. Pro la graveco de la menciitaj informiloj, ilia ne-publikigo signifis perdi eblecojn diskonigi la asocian agadon kaj, samtempe, ne sufiĉe nutri la movadanojn pri konindaj aspektoj de la landa kaj internacia E-movadoj dum la jaro. Tamen, **Jajabo** (Sancti Spíri-tus), **La Fontano** (Villa Clara), **La Giraldilla esperantista** (Urbo Havano), **Antaŭen** (Camagüey), **La Famo** (Guantánamo)... kelkfoje aperis dum la jaro.

***1.4. Ebligi regulan aperon de KEA en la internacia E-gazetaro.*** Tradicie ni havas kiel laboraspekton iel stimuli la esperantistojn kontribui al la apero de KEA en la internacia E-gazetaro; sed, dum 2000 tiu ĉi tasko ne estis sufiĉe vigla, malgraŭ la laboro de la koncerna estrarano. Tamen potencialo estas pli alta kaj ni devas konstante alvoki aliajn talentajn esperantistojn pli aktivi en tiu agadkampo.

***1.5. Atenti la oficialan hejmpaĝon de KEA kaj regule ĝisdatigi la informojn.*** Rilate la hejmpaĝon de KEA en internet, ĝi daŭre estis atentata de García Fumero, sed dum la jaro 2000 oni ne sukcesis aktualigi ĝin, ĉar ĉiuj demarŝoj tiucelaj malsukcesis. Ŝajne neniu ĉe la provizisto de la servo respondecas pri tiaj aferoj, kaj nek telefonaj demandoj nek plendoj al la retadreso de la administranto sukcesis veki reagon. Tio estas bedaŭrindaĵo, ĉar multe ĝi kontribuas al informado pri la ekzisto de KEA nacie kaj internacie.

**2. Naciaj kaj internaciaj eventoj**

***2.1. La filioj garantiu kulturan programon omaĝe al la 21-a datreveno de KEA.*** Laŭ konkretaj kondiĉoj la filioj organizis diversajn aranĝojn kaj ankaŭ diskonigis ilin. La centra aranĝo estis organizita en Havano kun la provinca filio. La okazo estis bone uzita ekde informa vidpunkto kaj ni konsideras ke estis bona momento en la vivo de KEA.

***2.2. Okazigi Nacian Renkontiĝon en Urbo Havano.*** La nacia renkontiĝo okazis tre sukcese. Partoprenis 55 reprezentantoj el sep provincoj, kiuj ne nur festis sed ankaŭ

profitis la okazon por analizi temojn rilatajn al edukado kaj kulturo. La organizintoj serioze laboris por garantii la plenan sukceson de la evento, kiu sendube imitindas. Tiaj renkontiĝoj devas esti daŭraj pro tio, ke ili stimulas la lokan movadon kaj estas fonto de inspiro por la esperantistaro.

***2.3. Okazigi Nacian Seminarion pri Informado en Sancti Spíritus***. La planita seminario ne okazis, esence pro lokaj malfacilaĵoj rilataj al loĝado, kio konsistigas sperton por la estonteco. Oni laboris en preparado de kondiĉoj surloke kaj dufoje ŝanĝis la daton, sed fine ĝi ne eblis.

***2.4. Atenti la okazigon de SAEST'2000***. La Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko okazis sukcese, ĉefe danke al la laboro de la Preparkomitato. La evento estis tre laboriga pro la konsisto mem de la programo. Partoprenis 51 reprezentantoj el 5 provincoj kaj esperantisto el Belgio (entute, 26 prelegoj, 6 afiŝoj, 2 vidbendoj kaj Ronda Tablo). Grava ero de ĝia enhavo estis hispanlingva sesio ĉe UNO-Asocio por la ekstera publiko, kie oni prezentis du prelegojn: **Esperanto: Tutmondigo kaj kulturo,** kaj **Sciencteknikaj in-formrimedoj pere de E-o**. Oni decidis pretigi **Teknika**-n **bulteno**-n kun la plej taŭgaj prelegoj, pri kio ni jam laboradas.

**3. Disvastigo tra la lando kaj revigligo de filioj**

Nia ĝenerala plano ĉi-rilate estis grandparte plenumita, foje pli bone, foje ne kiel atendite, sed en aliaj kazoj tre bone. Temas pri konstanta asocia bezono kreskigi kaj disvastigi la movadon, malgraŭ tio, ke ne ĉiam ni sukcesu en difinita periodo, kio neniel povas malentuziasmigi nin, sed male instigi nin al konstanta semado. Tamen, ni konsideras tre valoraj la atenton kaj vizitojn al filioj dum la jaro, ĉar pere de ili la naciaj estraranoj havis la ŝancon taksi kaj stimuli la laboron faritan kaj faratan de la esperantistoj tra la lando.

***3.1. Labori por reviglígi la movadon en tiuj teritorioj kun jura personeco: Insulo de la Junularo kaj Havano.*** <u>**Insulo de la Junularo**</u>: Dank' al la laboro farita tie dum la jaro '99, oni daŭrigis la agadon surloke dum la jaro 2000, ne ĉiam tiel sukcese kiel planite, sed kontentige. Rezulto de taŭga agado tie estis la plialtigo de la nombromembro el 6 en la unua semestro al 14 en la dua. <u>**Havano**</u>: Malgraŭ la fakto, ke oni intencis plurfoje aktivigi la agadon en tiu provinco, rezultoj ne videblas; reale, ni konas nenion pri nuntempa agado surloke. Esperantistoj elQuivicán parolas pri loka grupo ema aktivi, sed nenio konkrete okazas. El Santa Cruz del Norte, nur hazardajn komentojn ni ricevas pri vivanteco de loka infangrupo.

***3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Matanzas, Las Tunas, Holguín, Cienfuegos, Pinar del Río kaj Villa Clara.*** <u>**Matanzas**</u>: Ni ne sukcesis kreskigi la movadon de Pedro Betancourt al aliaj teritorioj, kaj en tiu municipo mem ĝi ne stabilas. Raulito plurfoje vizitis la Nacian Sidejon kaj oni profitis la okazojn paroli pri la situacio, sed oni ne vidas reaktivadon de la laboro. Nek agadon surloke nek informojn oni havis, preskaŭ dum la tuta jaro. <u>**Las Tunas**</u>: La agado tute falis. Laŭ telefonaj kontaktoj, nur Osmundo aktivas kaj pretas labori, sed nek informojn nek kotizojn ni ricevis dum la jaro, malgraŭ la fakto, ke ĉiumonate la NE sendis tien siajn protokolojn. <u>**Holguín**</u>: La laboro en tiu

orienta filio pli- malpli samas al tiu de 1998 kaj 1999, ĉar ĝi ne malkreskis, sed ankaŭ ne kreskis; tamen, menciendas la laboro de Isnel Pupo k. Raymond Fonseca rilate al infanoj. Vizito de estrarano permesis taksi la laboron surloke kaj transdoni kelkajn ideojn pri organizaj kaj financaj aferoj. **Cienfuegos**: La afero marŝis pli-malpli samkiel en Pedro Betancourt, ĉar ne estis vera aktivado de la esperantistoj, la membrononbro ne kreskis, sed malkreskis, kaj informoj mankis preskaŭ dum la tuta periodo, kiel dum la dua semestro '99, pro la fakto ke Vergel eklaboris for de la urbo kaj ne videblas teama laboro. **Pinar del Río**: Delonge la Nacia Estraro laboras por eknaskigi novan grupon en la pli okcidenta provinco, sen konkretaj rezultoj. La baptopatroj kelkfoje intencis trovi vojojn tiucele; fine de la jaro '99, oni trovis kelkajn interesitojn pri la lingvo, sed kunordigo mankis kaj tio ne sukcesis ĝis nun. **Villa Clara**: La laboro farita dum la unua semestro de la jaro, poste disfalis pro speciala situacio kun la eksa prezidanto, kiu meritis apartan atenton de la Nacia Estraro. Unua vizito estis urĝe farita de la Ĝenerala Sekretario; posta vizito kune farita kun la Prezidantino plus pliaj vizitoj kaj kunordigoj de la Ĝenerala Sekretario kaj la estraranino pri Financoj, kun rekta partopreno kaj aktiva laboro de Jesús Medrano kaj aliaj lokaj esperantistoj, ebligis la reorganizon de nova estraro kaj ekfunkciigon de la movado en la filio, per elekto de nova prezidanto provinca, S-ro. Daniel Alemán. La ĉefa rezulto de tiu intensa agado ambaŭflanka estas la okazigo de tiu ĉi Komitatkunsido.

## 4. Organizaj demandoj kaj interna administrado

Dum la jaro, la situacio rilate al organizado kaj interna administrado montriĝis ĝenerale sufiĉe stabila. Tamen, ni regule devas insisti pri la bezono, ke la filioj plibonigu siajn respektivajn kontrolojn kaj estu pli akurataj en sendado de dokumentoj pri membrokontrolo, kotizo, kotizkvitancoj, protokoloj kaj aliaj informoj. Ni devas mencii, ke la plej akurata filio tiusence dum la periodo estis Camagüey; ankaŭ menciindas la regulecon en la informo de Sancti Spiritus, kiu estis la sola raportinta laŭ trimestroj, dum la ceteraj tion faris iom lante kaj ofte po partoj aŭ faris preskaŭ nenion, kio ne kontribuis al bona tutlanda organizo en tiu aspekto. Bezonatas ankoraŭ plibonigi tiun ĉi agadon kaj finaranĝi la ĝeneralan uzon de la nacia modelo por kontrolo de la membraro, la koncernajn kotizkvitancojn kaj ties kongruo kun la membrokontrolo, tiel ke oni povu pli travideble havigi al si la plej fidindan informon pri niaj membroj dum la diversaj periodoj de la jaro.

***4.1. Membro-kontrolo kaj kotizo.*** La plimulto de la filioj dum la jaro ne sendis ĝustatempe la informojn pri membrokontroloj kaj la koncernajn kotizojn kaj kotizkvitancojn, kaj en kelkaj kazoj tiuj malfruaj informoj alvenis al la NE kun malkongruoj aŭ manke de kelkaj bezonataj aferoj, kiuj krome malhelpis. La plej bona filio en tiu ĉi aspekto estis Camagüey. Ni ne povas atendi ĝis la lasta momento por koni la realon ĉar tio estas malavantaĝo por nia daŭra laboro. Ĉiuj devas gajni akuratecon tiusence.

**STATISTIKO PRI MEMBRO-KONTROLO/2000***

| | 1-a Semestro | | | 2-a Semestro | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **Filio** | **Membroj** | **PKK** | **Totalo** | **Membroj** | **PKK** | **Totalo** |
| P. del Río | - | - | - | - | - | - |
| Havano | - | - | - | - | - | - |
| U. Havano(*) | 166 | 35 | 201 | 166 | 30 | 196 |
| J. Insulo | 6 | - | 6 | 14 | - | 14 |
| Matanzas | 17(22)** | - | 17(22)** | - | - | - |
| Cienfuegos | 9 | - | 9 | - | - | - |
| V. Clara | 39 | - | 39 | - | - | - |
| S. Spíritus(*) | 11 | 1 | 12 | 5 | 1 | 6 |
| C. de Ávila | 1 | - | 1 | 1 | - | 1 |
| Camagüey | 219 | - | 219 | 153 | - | 153 |
| Las Tunas | - | - | - | - | - | - |
| Holguín | 30 | - | 30 | 1 | - | 1 |
| Granma(*) | 32 | 1 | 33 | 2 | 5 | 7 |
| Stgo. de Cuba(*) | 84 | - | 84 | 69 | - | 69 |
| Guantánamo(*) | 30 | - | 30 | -(43) | -(5) | -(48)** |
| PKK-NE(***) | - | 36 | 35 | - | 34 | 34 |
| **Totaloj** | 644(649) | 73 | 717(722) | 411(454) | 70(75) | **481**(529) |

**Simboloj:**

(*) Atentas PKK-n en siaj koncernaj teritorioj.

(**) Matanzas kaj Guantánamo raportas 5 pliajn membrojn sen kotizkvitancoj.

(***) La NE atentis, dum la jaro 2000, la jenajn kvantojn da pokokoanoj:

| | | |
|---|---|---|
| P. del Río | 2 | 2 |
| Havano | 19 | 18 |
| U. Havano | 1 | 1 |
| J. Insulo | 1 | 1 |
| Matanzas | 3 | 1 |
| Cienfuegos | 4 | 4 |
| V. Clara | 1 | 1 |
| Las Tunas | 1 | 1 |
| Holguín | 3 | 2 |
| Stgo. de Cuba | 1 | 1 |

***4.2. Atento kaj vizitoj al filioj.*** Dum la jaro la atento al filioj estis plenumata pere de diversaj rimedoj, nome kontrolvizitoj, teknikaj kaj privataj vizitoj, leteroj, protokoloj kaj

telefonado. Ni faris plurajn al Santa Clara k. Santo Domingo (Villa Clara) kaj Santiago kaj po unu al Camagüey, Holguín, Granma, Guantánamo, Sancti Spíritus; aliaj personaj kontaktoj okazis kun Urbo Havano, Havano, Matanzas, Cienfuegos, I. de la Junularo, Ciego de Avila k. Pinar del Río; kaj telefonaj kun Las Tunas.

***4.3. Kontrolo kaj atento al membroj-subtenantoj.*** Ni kontrolis ĉiujn membrojn subtenantojn tra la lando kaj sendis la unuan eldonon de **Avanco**.Tamen, ni konsideras ke ĉi agado ne estis sufiĉa. Mankis daŭraj kontaktoj je nia flanko kaj tio vere malhelpas la agadon de la Asocio, ĉar ju pli ni atentos ilin des pli da ili ni havos.

***4.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon.*** Ĉikaze, ekde la komenco de la jaro, ni pro diversaj kialoj kontaktis ilin telefone, persone aŭ letere; kaj, samtempe, la NE sendis ĉiam al ili la monatajn protokolojn kaj informojn pri kontrolvizitoj. Tamen, ĝi estas plibonigenda tasko de ĉiu estrarano.

**5. Publikaj rilatoj**

Niaj publikaj rilatoj ĝenerale stabilis dum la tuta jaro, sed restis sub la reala potencialo plenumenda. Kiel tradicie, ni faris plurajn kontaktojn okaze de niaj aranĝoj naciaj kaj regionaj, kio devas resti kiel principo kaj tiucele oni devas pli regule tion fari kaj poste flegi la jam faritan kontakton.

***5.1. Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj k. kulturaj instancoj je ĉiu nivelo; daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano. Kunlabori kun tiaj instancoj laŭeble.*** La rilatoj kun politikaj, registaraj kaj aliaj instancoj je ĉiu nivelo estis konstante flegataj nacie kaj loke far la filioj, inter aliaj: la kultura fako de la Komunisma Partio, ministerioj pri Kulturo kaj Justico, ktp, kvankam bezonatas pli da kunlaboro farebla laŭ permanenta maniero. Kun la rilatorgano, regule okazis kontaktoj, sed ni devas labori por ke estonte tia laboraspekto fariĝu ne nur informa de ni al ili, sed iamaniere pli kunlabora.

***5.2. Ligi la Asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko kaj levi la influon en la komunumo.*** Niaj ligoj kun la kultura vivo de la teritorio daŭris kaj plifortiĝis kun kulturdomoj, bibliotekoj, kelkaj komunumoj kaj aliaj kulturaj instancoj, kvankam tio ankoraŭ plibonigendas ekde diversaj vidpunktoj kaj survoje al pli altaj atingoj. Tia agado bezonas pliajn konkretajn projektojn por vera efektivigo.

***5.3 Rilati al aliaj asocioj kulturklerigaj, UNESKO, UNO, Kariba-Asocio kaj la Kuba Movado por la Paco; laŭkaze, iniciati konkretan kunlaboron.*** Dum 2000, ni atingis pli fortajn kontaktojn kun kelkaj kulturklerigaj asocioj. Krom la Eldonejo José Martí (nia rilatorgano), ni sukcesis ampleksigi nian interrilatan laboron kun UNO-Asocio kaj Asocio pri Lingvistoj. Alifoje kunordige kun Unuiĝintaj Nacioj, KEA organizis simpozion pri la temo **Esperanto: Scienco k. Tekniko**. Meze de la jaro, KEA, partoprenis la Kariban Festivalon en Santiago de Cuba. Aliaj kontaktojn oni faris, interalie kun la Kariba Asocio, sed ĝis nun ne estis fruktodonaj. Kun ICAP, oni havis kelkajn kontaktojn rilate al la temo de sendaĵoj por KEA kaj tio efikis.

**6. Financoj**

***6.1. Flegi la internan administradon de KEA-sidejoj.*** La administraj taskoj plenumitaj dum la jaro koncentriĝis en la plua funkciado, riparado kaj aliaj laboroj de la Nacia Sidejo de KEA, kiu dum la jaro plenumis diversajn servojn al interesitoj, vizitantoj kaj esperantistoj el la lando kaj eksterlandaj. Oni devis ekde financa vidpunkto daŭre flegi la administran laboron, atenti la laboristojn kaj aliajn taskojn de la interna funkciado. Tiurilate, oni devas ankoraŭ strebi por plibonigi la servojn kaj la fluon de informoj tra la CO.

***6.2 Plenumi efike la buĝeton de la nacia banko, BFI k. PF-kontoj.*** La jaro estis aparte malfacila por mastrumado de la buĝeto jen en pesoj jen en valutoj; tamen, oni sukcesis garantii la esencajn servojn, kvankam bezonatas ankoraŭ plua servado al la esperantistaro tutlande. Rilate al valutoj, estis iom pli malbona situacio: ne estis deficita, tamen, ne eblis plenumi la buĝeton planitan.

***6.3. Prizorgi la regulan funkciadon de la Financa Komisiono laŭstatute.*** La komisiono nacia estis kompletigita dum la Komitatkunsido en Santiago de Cuba kaj, dum la jaro, oni faris la koncernan financan reviziadon nacinivele; estus bone fari same en aliaj asociaj instancoj, ĉar tio multe povas kontribui al la financa sano de la filioj. La NE kontraktis kun CANEC, nome la konsultejo de la Asocio de Ekonomistoj, por reviziado de la financoj, kio efektiviĝis fine de la jaro; tio estas ke oni ricevis internan kontrolon, kies rezulto donis al KEA la klasifikon **Kun Kontrolo**, kio ja estas tre kontentiga por la Asocio. Ankaŭ aliaj filioj, kiel Camaguey, ricevis apartajn kontrolvizitojn de koncernaj institucioj surloke.

***6.4. Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.*** Dum la jaro oni daŭre insistis pri tio ke la filioj bone kontrolu siajn financojn kaj, tiucele, filio Camagüey faris demarŝojn, sukcese, por havigi al si la rajton komercan, kio ja estas bona paŝo por memfinancado. Ni konscias ke tiu ĉi tasko devas esti konstanta.

**7. Instruado**

La jarraporto pri tiu ĉi fako ne multe malsamas ol tiu de aliaj branĉoj en la ĝenerala laboro de KEA, pro la fakto ke la plimulto de la filioj ne sendis siajn raportojn pri la surlokaj agadoj, sed ĉikaze estas pli komplika, ĉar rilate al kursoj oni nepre bezonas detalajn ciferojn kun ĉiuj elementoj. Nur informis Sancti Spíritus, Camagüey kaj Urbo Havano, Granma raportis pri la PKK kaj el Santiago oni ricevis tion per telefono. El la aliaj filioj, ni havas nenion, kaj pro tio ni ne povas bildigi ilian laboron en rilato kun la instrua agado.

***7.1. Regulaj kursoj.*** Oni povas konstati ke ankoraŭ ni devas multon fari por sukcesigi niajn regulajn kursojn tutlande eĉ en tiuj provincoj kie tradicie oni havis tre bonajn rezultojn, kaj ankoraŭ multe pli por sendi ĝustatempe la koncernajn informojn, tiel ke oni povu pli bone kaj pli ĝuste bildigi la laboron de la filioj.

| Filio | 1-a Semestro 1-a Niv. | 2-a Niv. | Sup. k. | 2-a Semestro 1-a Niv. | 2-a Niv. | Sup. k. |
|---|---|---|---|---|---|---|
| U. Havano | 57/31 | 23/14 | 13/10 | 62/ - | 27/ - | 6/- |
| S. Spíritus | 0 | 0 | 0 | 1/0 | 0 | 0 |
| Camagüey | 60/42 | 40/32 | 0 | 80/ - | 0 | 15/ - |
| Stgo. de C. | 40/28 | 19/14 | 14/10 | 24/ - | 18/ - | 10/ - |
| Granma | - | - | - | - | - | - |

Rimarko:
*La numeralo montras la kvanton da enskribiĝintoj, je la komenco de la kurso; kaj la denominatoro indikas la kvanton da sukcesintoj, je la fino. Jen la rezultoj de tiu laboro:

***7.2. Kreskigi la PKK-n kaj daŭre atenti ties partoprenantojn diversmaniere***: Laŭ niaj kontroloj, la Asocio ne vere plenumis tiun ĉi taskon, escepte Urbo Havano. Tio indikas ke ni ĉiuj malbone agadis en rilato kun la PKK, malgraŭ havi novajn eblecojn por plifortigi ĝin tra la lando. Ni konscias, ekzemple, ke la PF Sancti Spíritus intencis kunsidi kun la pkk-anoj, sed ankaŭ la rezultoj estis nulaj.

| Filio | Interesiĝis | Enskribiĝis | Daŭrigis |
|---|---|---|---|
| U. Havano | 126 | 38 | 4 |
| N. Estraro | 67 | 32 | 10 |
| S. Spíritus | 9 | 0 | 1 |
| Camagüey | - | - | - |
| Granma | 17 | 6 | 2 |

Rimarkoj:
*De la 38 enskribiĝintoj de U. Havano, 16 aĉetis la tutan kurson per unu fojo, 15 aĉetis la duonon kaj 7 enskribiĝis laŭ la tradicia alternativo.
**En la kazo de aliaj provincoj rekte atentataj de la Nacia Estraro, aĉetis la materialojn 4, 22 kaj 6, respektive.

***7.3. Okazigi regionan seminarion por instruistoj en Camagüey por altigi ilian lingvan kaj kulturan scipovon***. Ĝi efektive okazis meze de novembro, sub la nomo Renkontiĝo pri Apliko de Esperanto en la Komunumo kun partopreno de esperantistoj el Guantánamo, Santiago, Granma, Sancti Spíritus, Urbo Havano, Camagüey kaj reprezentanto de la Nacia Estraro. La evento bone okazis, tamen ne nur pri Instruado, sed ankaŭ inkludis aliajn kulturajn erojn same utilajn por nia esperantistaro.

***7.4. Ekspluati kaj profiti ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de nia membraro: Distanca Kurso, konkursoj, prelegoj,...*** La plimulto de la filioj ne profitas ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de la esperantistaro. Taŭgaj kontaktoj kun la membraro tra la lando permesas konstati tion. Mankas iniciatoj

k. postuloj en kelkaj filioj por tion fari. Oni devas ŝanĝi la sintenon en tiu celo aŭ neniam ni havos movadon sufiĉe fortan k. kapablan ekde lingva kaj kultura vidpunktoj. Elstaras pro la altvalora laboro ĉisence la PF Urbo Havano, kiu dum la periodo organizis semajnfinajn konversaciajn seminariojn, prelegojn, forumojn kaj konkursojn, kun efikaj rezultoj por la partoprenintoj. Aliflanke, la Distanca Kurso stagnas naciskale, ĉefe pro manko da propagando kaj serioza laboro tiurilate. Dum la jaro, nur du personoj sendis la lernomaterialojn kun la koncerna tasko farita. Oni reviziis kaj resendis ilin kun la nova tasko, sed ne plu esti reago. Fine de la jaro, oni komencis altnivelan kurson.

***7.5. Atento al ILEI-Sekcio kaj ties respondeculoj en la diversaj filioj.*** Ni tutcerte konsideras ke la laboro en tiu ĉi agadkampo de la Asocio estas plibonigenda, sed tio postulas pli da seriozeco kaj sistema atento al nia laboro. Bezonatas ankaŭ plibonigi la informfluojn inter la filioj kaj la NE. En la internacia sfero, nia Kuba ILEI-Sekcio estis reprezentata pere de nia Prezidantino en la 34-a ILEI-Konferenco, okazinta en La KvinPetalo, Francio.

***7.6. Nacia Seminario por Instruistoj.*** De la 6-a ĝis la 8-a de julio 2000, ni organizis la jam tradician Nacian Seminarion por Instruistoj (la naŭan). Partoprenis ĝin 9 geinstruistoj el 4 filioj. Evidentiĝis ke la plimulto inter la partoprenintoj estis ne informitaj pri la konsisto de la Seminario kaj pri tio kion ili devis pretigi antaŭ kaj dum la Seminario, kiel informite per letero de la 20-a de majo. Kadre de la Seminario, oni prelegis, prezentis modelajn lecionojn kaj interŝanĝis spertojn. Kiel en la antaŭaj jaroj, oni taksis ĝin sukcesa, laŭ la opinioj de la par-toprenintoj. Ĉiam pli kaj pli ni klopodas alĝustigi kaj perfektigi ilin tiel ke ili plenumu sian celon.

## 8. Kulturaj kaj klerigaj aranĝoj

Ni konsideras ke la kultura laboro tra la lando dum 2000 estis bona, tamen plibonigenda. Pri tiu afero en filioj, ni ne multe konis dum la jaro, ĉar informoj mankis. Nur en la kazo de U. Havano oni havas precizigojn, kie ekzistis semestraj planoj por aranĝoj, kaj ofte ni ricevis protokolojn.

***8.1. Konsciigi la membraron pri la historiaj k. kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj.*** Regule la membroj de la NE, kaj kelkaj estraranoj kaj aktivuloj tra la lando, klopodas pli kaj pli levi la konscion de nia membraro, pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado, profitante la diversajn E-aranĝojn por priparoli tiujn temojn, okazigi konkursojn kaj krei la etoson taŭgan en niaj renkontiĝoj kaj eventoj, por pli altigi ilian kulturan nivelon (la plej bona ekzemplo en rilato kun tio estas Urbo Havano). Kompreneble, tio ne ĉiam okazas ĉie kaj multe pli ankoraŭ ni devas fari por ke la membraro en la filioj profitu ĉiujn eblajn momentojn kaj ekspluatu siajn kapablecojn. Kelkfoje, la filioj paneas tiusence kaj nur dum kontrolvizitoj kaj renkontiĝoj organizas ion. Naciskale la tuta esperantistaro devas pli profiti la rezultojn de la konstanta laboro

de la Komisiono pri Historio, kvankam ni mem devas serĉi manieron konkretigi tion kunlabore kun la filioj, sed ankaŭ ekzistas aliaj eblecoj.

***8.2. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultara programo omaĝe al la 21-a datreveno de KEA.*** Okaze de la 21-a datreveno de KEA, oni organizis kaj aranĝis kulturajn renkontiĝojn en kelkaj filioj. La Centra Aranĝo okazis en KEA-Sidejo de Centro Havano kun partopreno de pli ol 80 homoj,

***8.3. Flegi la kulturan aktivadon de la filioj k. provizi ilin per taŭgaj materialoj tiucele.*** Dum la jaro oni flegis la kulturan aktivadon de la filioj, sed ni ne povas esti kontentaj pri nia laboro tiusence. Konstanta tasko de Kulturo estas garantii monatajn aranĝojn en la diversaj filioj, ankaŭ en la Nacia Sidejo. Kelkaj filioj faras aranĝojn en kulturdomoj kaj en la komunumoj, sed ankoraŭ mankas organizi pli ofte kulturklerigan etoson celante ke la membraro montru sin kaj altigu sian nivelon ekde lingva, historia kaj kultura vidpunkto en rilato kun Esperanto

***8.4. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn.*** Tiu ĉi aspekto estas plibonigenda. Oni devas strebi por varbado de profesiaj artistoj kiuj povas regule kunlabori kun la Asocio, ĉar tio garantios pli altnivelajn kulturajn prezentojn. Oni ja kontentige proksimiĝis al kulturdomoj kaj grupoj kiuj partoprenis en diversaj aranĝoj kaj renkontiĝoj, kio estis sufiĉe instiga por pripensi daŭran laboron tiudirekte. Oni devas pli atenti la artistojn kiuj daŭre pretas kunlabori.

***8.5. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj kaj komunumaj. Partopreni la Havanan Librofoiron.*** Dum 2000 nia kultura fako iomete pli emfazis sian agadon en la bezonata reprezentiĝo de KEA en eksterasociaj kulturklerigaj eventoj, kiel necesa konstanta laboro, tiel ke ĝi kontribuos pli altigi la prestiĝon de la Asocio kaj Esperanto kiel lingvo, kio devas esti aktiva parto de niaj taskoj. Elstaris la partopreno en la simpozio **Esperanto: Scienco kaj Tekniko**, en kunordigo kun Unuiĝintaj Nacioj. Ankaŭ menciindas partopreno en la Deka Internacia Konferenco pri Literaturo kaj Lingvistiko pere de prelego de Juan Ramòn Rodriguez pri **Esperanto: Filologia Filozofio aŭ Filozofia Filologio** kiu ricevis premion, nome eldonrajton. Tamen, ankoraŭ ni povas multe pli aktivi en eksterasociaj medioj. Rilate al Havana Librofoiro, ne eblis partopreni, ĉefe pro la fakto ke ni ne sukcesis enskribiĝi ĝustatempe. Ni ofte devas zorgi pri la alvokoj al tiu grava evento.

***8.6. Zorgi pri la korekta utiligo de bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj kaj ebligi tiajn servojn en tiuj teritorioj kie ankoraŭ ne estas.*** Ne sufiĉas ke ĉe la Nacia Sidejo de KEA ekzistu unu el la plej riĉaj kolektoj da libroj en nia kontinento, kiam la plejmulto de nia membraro preskaŭ ne interesiĝas pri tio. De antaŭ du jaroj, eblas pruntedoni librojn al kiu ajn interesito tra la lando kaj, ĝis nun, minimuma kvanto pruntepetis librojn, ĉefe el Urbo Havano. Krome, en kelkaj urboj estas stokoj da E-libroj en la provinca aŭ loka biblioteko, sed la esperantistoj ne uzas ilin. Kompreneble, la uzado de tiuj kolektoj dependas ankaŭ de nia kapablo stimuli nian membraron pli legi.

***8.7.Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn.*** Dum la restado de esperantistoj en kampadejoj kaj regionaj renkontiĝoj, oni multe profitis la okazon montri kaj ekstergi nian kulturon; tiel multaj ne esperantistoj konas pri la agado de nia Asocio. Dum la jaro, la partopreno estis bona, ĉar multaj kamaradoj aktive agis legante poemojn, kantante; tiel oni pliriĉigis la enhavon de la programo; en kelkaj el ili partoprenis eksterlandaj vizitantoj. Do, la kulturaj eventoj estis farataj laŭplane kaj tiusence ni devas ankoraŭ pli insisti en la kvalita preparo de la kulturaj eroj en ĉiuj regionaj renkontiĝoj, tiel ke ili fariĝu veraj kulturaj momentoj per kiuj la esperantistoj pli konatiĝu kun la E-kulturo.

***9.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI, Germana E-Asocio kaj aliaj landaj asocioj, lokaj kluboj, k. aliaj E-institucioj.*** Dum 2000, ni daŭrigis regulajn rilatojn kun diversaj landaj, regionaj k. lokaj asocioj. Oni havis multajn kontaktojn kaj rilatojn kiuj plenumis tiun ĉi taskon. Ni ankaŭ sendis la asocian organon al ĉiuj kontinentoj, el kiuj iom post iom oni ricevis samtempe iliajn informilojn. Al tio aldonendas, nia laboro eksterlan-den per la elektronika poŝto. Krome, kelkaj esperantistoj partoprenis en internaciaj eventoj kaj spertis je lokaj E-grupoj: januare, Juan Ramón Rodríguez prelegis en la Londona Klubo, Manĉestro kaj Liverpulo; meze de la jaro, Maritza Gutiérrez reprezentis la Asocion en la 85-a UK, en Tel Avivo, kaj en la ILEI-Konferenco; kaj Marta Alonso ĉeestis la Brazilan Kongreson kaj prelegis en diversaj urboj en tiu lando. Ankaŭ S-ino Mayra Núñez kaj Roberto Cutiño restis kelkajn monatojn en Eŭropo, kie ili partoprenis diversajn E-renkontiĝojn. Daŭras kunlaboro kun La Verda Stelo, sub iniciato de Eddy Raats.

**9. Internaciaj rilatoj**

***9.2. Daŭra kontribuo al evoluo de E-o en Latinameriko k. aktive kunlabori kun la regiona informilo.*** Ni daŭrigis niajn jam kutimajn kontaktojn kun landoj de tiu ĉi kontinento, ĉefe latinamerikaj. Ni ne nur adresis leterojn kaj informilojn al ili, sed ankaŭ okazis personaj kontaktoj. Dum la periodo vizitis la landon la prezidanto de Urugvaja E-Asocio kaj esperantisto el Kostariko kiu nuntempe loĝas en Bahamoj. Krome, Maritza partoprenis en la Kunsido pri Ameriko ĉe la UK, kie raportis pri nia laboro kaj rekte interŝanĝis kun ĉeestintoj el nia kontinento. La samtempa restado de Marta en Brazilo permesis plurajn interrilatojn favorajn al nia poramerika agado kaj pri la venontjara UK en tiu lando. Dum la tuta jaro, kelkaj el ni havis regulajn interretajn kontaktojn kun Atilio Orellana, UEA-Komisiito pri Ameriko. Oni daŭre esprimis la pretecon konkretigi kunlaboron kun Meksika E-Federacio, sed tio ne konkretiĝis ĝis nun, malgraŭ la diverstipaj intencoj tion plenumi. Ofte aperis informoj pri nia movado en la regiona informilo kaj multaj personoj interesiĝas pri la poresperanta agado en Kubo, eĉ pri la ebleco vojaĝi al nia lando.

**10. Faka agado**

Ĉi- jare la Faka Agado havis pli aktivan laboron, ĉefe en rilato kun la sukcesa okazigo de la V-a Nacia Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko.

***10.1. Atento al interesitoj pri faka agado tutlande.*** Oni ĉiam atentas la homojn kiuj interesiĝas pri tiu ĉi laborsfero, tamen la rezultoj ne ĉiam estas sufiĉaj. Malgraŭ tio, en 2000, tiu laboro kontentige marŝis, almenaŭ dum la unua parto de la jaro, okaze de SAEST.

Oni devas daŭre instigi la esperantistojn tra la tuta lando al apliko de E-o en la respektivaj laborsferoj.

***10.2. Daŭre informi al la membraro pri apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko, enlande kaj eksterlande.*** Oni laboris por daŭre informi la esperantistojn pri Scienco kaj Tekniko. Oni intencis arigi diversajn fakgrupojn, sed ankoraŭ ni ne sukcesis tiurilate. Temas pri daŭra informa laboro, sed bezonatas pli da persisto kaj subteno de la filiaj estraranoj.

***10.3. Kontroli kaj stimuli fakulojn al utiligo de Esperanto en Scienco k. Tekniko. Garantii la efektivigon de SAEST'2000.*** Tiu ĉi aspekto, ankoraŭ estas tre baza k. ne respegulas la potencialon ekzistantan en la tuta insulo. Tamen la ĉijara okazigo de SAEST montris bonan reagon far la esperantistoj kiuj agas en rilato kun Scienco kaj Tekniko tutlande. Nova maniero stimuli la agantojn por ST estas aperigi specialajn eldonojn de **Teknika bulteno** kun la plej sukcesaj prelegoj, kion ni decidis fari jam ekde la jaro 2000. Ĝis la fino de la jaro, oni pretigis kondiĉojn por eldoni ĝin.

***10.4. Flegi la agadon de KEMA.*** Oni laboris dum la jaro speciale pro la preparlaboroj rilataj al SAEST'2000. La medicinistoj estas en kontentiga kontrolo flanke de la komisiito; sed la obstaklo estas la ne kontentiga lingvonivelo de tiuj specialistoj, kiuj tamen interesiĝas pri diskonigo kaj interŝanĝo inter si.

**11. Libroservo**

***11.1. Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la Libroservo.*** Dum la tuta jaro, ni laboradis por pliriĉigi niajn stokojn en la Libroservo. Ni sukcesis prepari 250 ekzemplerojn de **Sabe Ud. Esperanto?** de la 1-a nivelo kaj 250 de la 2-a, reprodukti 134 kasedojn (**Juliano kantas**, **Latinamerika mozaiko**, **Voĉoj el Kubo, Pensi kaj ami esperante,** kaj instrukasedojn), havigi al ni 50 ŝlosilingojn, transpasi kelkajn librojn el Biblioteko al Libroservo, ktp.

***11.2 Zorgi pri la korekta kaj efika funkciado de la libroserva sistemo tutlande.*** Ekde la unuaj momentoj, la estrarano pri Financoj serioze entreprenis la aferon kaj, pro tiu koncepto, ni sukcesis enspezi 6 682,00 kubajn pesojn kaj 488,94 dolarojn (ĉefe dum UK, ILEI-Konferenco kaj la Brazila Kongreso). Rilate al filioj, Santiago ŝuldas 146,00 kubajn pesojn al la Nacia Estraro pro tiu koncepto kaj, de la jaro 1999, pendantas aliaj 100,00 el Pinar del Río.

**12. Atento al alilandaj esperantistoj**

***12.1. Atento al interesitoj viziti Kubon k. reagi al tiaspecaj informpetoj.***
Dum la jaro, KEATUR (nia faka grupo por atenti alilandajn esperantistojn) daŭre laboris por plenumi siajn taskojn. Dank' al tia agado, dekoj da eksterlandaj interesitoj viziti Kubon ricevis retpoŝte la petatajn informojn: eblaj vizitotaj landpartoj, loĝlokoj, trans-portado, prezoj,... Tiamaniere oni organizis ĉion en rilato kun tiuj kiuj vizitis nian insulon el Urugvajo, Kostariko, Hispanio, Francio, Nederlando, Belgio, Pollando, ktp. Kompreneble, ne ĉiuj kiuj

petas informojn vizitas la landon, kaj tio ne signifas malbonan laboron, ĉar ili informiĝas kaj poste decidas kien vojaĝi. La ĉefa afero tiudirekte estas doni la petatajn informojn, kaj tion oni faras, kiel eble plej precize. El eksterlando rimarkindas la kontribuo de Eddy Raats, kiu multe helpas la Asocion kaj speciale la laboron de la grupo. Dum la periodo elstaris vizito de Andrzej Grzebowski, prezidanto de Monda Turismo.

***12.2. Pretigi lokajn esperantistojn ekde informa vidpunkto por atenti alilandajn esperantistojn.*** Tiu ĉi grava laboro daŭris dum 2000, pli efike por la membroj de la grupo en Urbo Havano, kiuj ampleksigis sian informadon en diversaj momentoj: i. a., Andrzej Grzebowski instruis okhoran specialan kurson pri ĉefaj aspektoj en rilato kun Monda Turismo, turisma laboro internaciskale, ktp. Je la fino, li disdonis **Diplomo**-n **je partopreno**, kiu atestas studunuon kadre de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo de Bydgoszcz (Klerigejo de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino). Krome, ĉiuj havanaj keaturanoj informiĝis pri diversaj aferoj en la urbo, per prelegoj; ĉikaze, menciindas **Historiaj antecedentoj pri la tombejo Kristoforo Kolombo**, far Marta Alonso. Alia grava afero en tiu ĉi fako estas plialtigi la lingvokapablon kaj en tiu direkto ankaŭ sukcesis la grupo en la ĉefurbo, ĉar oni partoprenis en altnivela kurso de Esperanto, kies enhavo estis: Historio kaj Literaturo de la Esperanta Movado, Fonetiko, Gramatiko, Organizo de la movado, Konversacia Leciono...

**13.- Atento al verkistoj**

Dum la jaro 2000, oni preskaŭ faris nenion en tiu ĉi aspekto, malgraŭ la oftaj petoj de la koncerna komisiito de KEA. Reale, rezultoj ne estis, sed ankaŭ mankis pli forta insisto kaj sindediĉo al tio. Sendube oni devas trovi aliajn rimedojn por la sukcesigo en rilato kun la reago de verkistoj.

***13.1. Kolekti la mankantajn materialojn por finpretigo kaj eldono de la libro omaĝe al 20-jariĝo de KEA.*** Ni bedaŭras pro ne sukceso de tiu ĉi tasko, ĉar temis pri grava datreveno de nia ekzisto, kaj vere la plimulto de la tekstoj jam pretas. Laŭ nia konsidero, mankis laboro taŭga en rilato kun tio. Oni devas replani tion, ne kiel omaĝon al la 20-a datreveno, ĉar tio jam ne decas, sed salute al la 4-a Kongreso de KEA.

***13.2. Prispuri la materialojn pri la novelaro por eventuala rehavigo kaj eldono.*** La situacio en rilato kun tiu ĉi punkto estis malpli efika ol tiu priparolita je 13.1, pro la fakto ke oni faris nenion.

***13.3. Daŭre instigi nian samideanaron interesiĝantajn pri beletro al verkado.*** Oni povas konstati ke ni devas multon fari por sukcesigi nian agadon ĉikampe. Ni devas daŭre instigi la esperantistojn tra la tuta lando al verkado esperantlingve. Tamen, krom instigoj, bezonatas reagoj kaj tio nek kutime nek hazarde aperas, pro diversaj kialoj. Ĉu manko de stimuloj? En la lastaj jaroj,oni ne sukcesas eĉ partoprenigi la esperantistaron en konkursoj. Indas serĉi novajn vojojn kaj rimedojn.

## 14. Tra la filioj

Kiel jam estas tradicio en niaj estraraj raportoj al la Komitato, ĉi tie oni metas resumon de la agado en tiuj filioj kiuj sendis jaran informon al la Nacia Estraro. Malgraŭ la fakto ke delonge ĉiuj provincaj kaj municipaj filioj, kaj municipaj grupoj, konas pri la bezonata jara raporto, en rilato kun la agado dum la jaro 2000 en la koncernaj teritorioj nur sendis informojn Camagüey, Urbo Havano, Sancti Spíritus kaj Granma. Jen kelkaj komentoj pri ili:

### Camagüey

En organiza agadkampo, la filio sendube avancis. Dum la jaro ili regule kunsidis kaj sendis koncernajn protokolojn. Rilate al aliaj laborsferoj, ili estis tre aktivaj en la publikaj rilatoj, pli fortaj ol dum la antaŭa jaro. La estraranoj ĉiam zorgis pri kunlaboro kun la ŝtataj organizoj. Tiu kunligado helpis multe la funkciadon de la filio kaj donis prestiĝon en la nuntempa periodo. La rilatoj kun politikaj, registaraj instancoj kaj la rilatorgano bone funkciis. En kelkaj fakoj, eĉ financa, ili faris seriozan laboron kiu speguliĝis en la Regiona Renkontiĝo okazinta meze de novembro. Oni regule okazigas diversajn kulturajn aranĝojn kaj pri historiaj temoj. La filio organizis en la lernejo Dr. Fernando Ortiz solenajn aranĝojn por honorigi historiajn datojn komence kaj fine de la kursoj. Dum tiuj momentoj oni liveris diplomon al la finkursanoj, ankaŭ okaze de la menciita Renkontiĝo. Ili daŭrigas diverstipajn E-kursojn (regula, ekspresa, radia kaj progresa).

### Urbo Havano

Dum la jaro 2000, la filio laboradis surbaze de laborplano en ĉiuj laborsferoj de la Asocio. Ili okazigis ĉiumonate la ordinarajn kunsidojn. Menciindas la laboro rilate kulturajn aranĝojn (19 sabataj kaj 4 kulturklerigaj), kreskigon kaj stabilecon de la movado (201 membroj en la unua semestro kaj 196 en la dua, cifero kiu inkluzivas 35 kaj 30 pokokoanojn, respektive) kaj la instrua laboro (en la unua kaj dua semestro, respektive, komencis kursojn 93 kaj 95 gelernantoj, kaj finis ilin 55 kaj 63, je la sama ordo). Je tiu ĉi lasta sfero, la filio okazigis 13 renkontiĝojn kun la lernantoj, 3 seminariojn pri Gramatiko, 4 konversaciajn rondojn, 2 renkontiĝojn kun instruantoj, kaj malfermis kunordige kun la NE altnivelan kurson por estraranoj (naciaj kaj provincaj) kaj aktivuloj. Rilate al informado, oni garantiis regulan diskonigon pri E-o kaj KEA-agado per naciaj kaj provincaj radiostacioj, televidkanaloj kaj uzis grafikan propagandon, ĉefe por varbi interesitojn por niaj kursoj: ĉi-kampe, oni ankaŭ muntis dumonatan ekspozicion en la Centro pri Dokumentado de la municipo Plaza de la revolución. kunlabore kun la NE, la filio organizis la centran omaĝon por la datreveno de KEA. Krome, reprezentantoj de la filio aktive partoprenis en SAEST'2000, la Nacia Seminario por Instruistoj, la 2-a Infanfestivalo kaj la regiona renkontiĝoj en Baracoa kaj Camaguey kaj amase ĉeestis la Nacian Renkontiĝon de Urbo Havano.

### Sancti Spíritus

Tiu ĉi filio, kune kun Camagüey estas la plej stabila kaj akurata en la sendado de informoj al la Nacia Estraro. Tio jam delonge okazas kaj same okazis dum la periodo, kun ĉiuj detaloj laŭ fakoj, eĉ la Jara Raporto, kaj tio ja validas.

Tamen, estas bedaŭrindaĵo la tiea situacio rilate al la movado, ĉar ĝi vere stagnas kaj nur malgranda grupo ekzistas. Dum la tuta jaro, la informoj montris tion kaj, je la fino, oni vidas

la samon: 10 kotizantoj en la unua semestro kaj 5 en la dua; 6 kunsidoj de la Provinca Estraro ne okazis pro malĉeesto de estraranoj; malgraŭ la daŭra propagando, radia kaj grafika, reago pri kursoj ne ekzistis (nur unu lernanto en la baza kurso); la radiosekcio preskaŭ malaperis; la ĉefaj kulturaj renkontiĝoj okazis dum la vizitoj de alilandaj esperantistoj, ktp. Do, la movadaj aferoj tie iom post iom malaperas kaj estas zorgiga situacio, ĉar temas pri leĝa filio kun longa vivo. Malgraŭ tio, kelkajn atingojn ili havas: rilate al 1999, la financoj kreskis pro enspezoj de kotizo; ĉiuj eldonnumeroj de **Jajabo** aperis; la rilatoj kun MINJUS daŭre stabilas; kaj ili regule sukcesas aperigi propagandon pri kursoj, eĉ per la radio. Spite al ĉio, rekonindas la seriozeco kaj ĝusteco de la Prezidantino kaj la Ĝenerala Sekretario, en rilato kun la informoj, ĉar ili respeguligas la veron.

**Granma**

Kiel rezulto de la ne bona laboro dum parto de la jaro 1999 kaj parto de 2000, la agado tie travivis malbonan situacion preskaŭ ĝis la fino de la unua semestro; sed post kelkaj demarŝoj kaj ŝanĝoj, oni komencis vidi vivsignojn kaj plifortigon de la movado. La Provinca Estraro reorganizis la movadon, ĉefe en la municipo Bajamo, sed ankaŭ adresis leterojn al esperantistoj en aliaj municipoj de la provinco, disvolvis fortan propagandan loboron per la radio (el kio venis reagoj por la perkoresponda kurso), rekontaktis la registarajn instancojn, sukcesis kreskigi la membronombron, faris ĉiujn estrarkunsidojn, partoprenis en ĉiuj naciaj eventoj kaj faris kelkajn kulturajn aranĝojn (en la kulturdomo, la komunumoj, ktp). Do, nuntempe la poresperanta agado avancas denove, kaj nun oni laboras por plikreskigi kaj firmigi la filian movadon.

## ĈEFAJ TASKOJ DE KEA POR LA JARO 2001

### 1. INFORMADO

1.1. Regula informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA, pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj, kaj per aliaj rimedoj, kum emfazo en la grafikaj, tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciiĝu pri nia agado.

1.2. Konsciigi la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E-o en sia medio por varbi novajn membrojn kaj amikojn de E-o.

1.3. Garantii la eldonon de la organo **Avanco** (4-foje jare), **La Noktuo** (4-foje), **Universo** (3-foje), k. aliaj filiaj bultenoj, k. ties distribuon al enlandaj k. eksterlandaj amaskomunikiloj k. institucioj.

1.4. Ebligi regulan aperon de KEA en la internacia E-gazetaro.

1.5 Atenti la oficialan hejmpaĝon de KEA kaj regule ĝisdatigi la informojn.

### 2. NACIAJ EVENTOJ

2.1. La filioj garantiu kulturan programon omaĝe al la 22-a datreveno de KEA (jun).

2.2. Okazigi Nacian Kulturan Festivalon en Camagüey (nov).

2.3. Okazigi Nacian Seminarion pri Informado en Sancti Spíritus (mar, 9-11).

2.4. Okazigi Nacian Renkontiĝon en Guantánamo.

2.5. Okazigi Nacian Seminarion por Instruistoj.(maj).

**2.6** Ekfunkciigi Preparkomitaton por la IV-a Nacia Kongreso de KEA.

**3. DISVASTIGO TRA LA LANDO KAJ REVIGLIGO DE FILIOJ**

3.1. Labori por revigligi la movadon en tiuj teritorioj kun jura personeco: Insulo de la Junularo, Havano, Villa Clara, Holguín kaj Sancti Spíritus.

3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Matanzas, Granma kaj Cienfuegos.

3.3. Labori por reaktivigi la agadon en P. del Río, Las Tunas kaj C. de Ávila.

**4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO**

4.1. Membro-kontrolo kaj kotizo.

4.2. Atento kaj vizitoj al filioj.

4.3. Kontrolo kaj atento al membroj-subtenantoj.

4.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon.

**5. PUBLIKAJ RILATOJ**

5.1. Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo; daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano. Kunlabori kun tiaj instancoj laŭeble.

5.2. Ligi la Asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko kaj levi la influon en la komunumo.

5.3. Iniciati konkretan kunlaboron kun aliaj asocioj kulturklerigaj, UNESKO, UNO, Kariba Asocio kaj la Kuba Movado por la Paco, Asocio je Lingvistoj.

**6. FINANCOJ**

6.1. Flegi la internan administradon de KEA-sidejo.

6.2. Plenumi efike la buĝeton de la nacia banko, BFI kaj PF-kontoj.

6.3. Prizorgi la regulan funkciadon de la Financa Komisiono laŭstatute.

6.4. Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.

**7. INSTRUADO**

7.1. Regulaj kursoj.

7.2. Kreskigi la PKK-n kaj daŭre atenti ties membrojn diversmaniere.

7.3. Okazigi regionan seminarion por instruistoj en Granma por altigi iliajn lingvan kaj kulturan scipovojn.

7.4. Ekspluati kaj profiti ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de nia membraro: Distanca Kurso, konkursoj, prelegoj, ktp.

7.5. Atento al ILEI-Sekcio kaj ties respondeculoj en la diversaj filioj.

**8. KULTURAJ KAJ KLERIGAJ ARANĜOJ**

8.1. Konsciigi la membraron pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj.

8.2. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo omaĝe al la 22-a datreveno de KEA.

8.3. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn.

8.4. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj kaj komunumaj.

Labori por partopreni la Havanan Librofoiron 2002.

8.5. Zorgi pri korekta utiligo de bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj k. ebligi tiajn servojn en tiuj teritorioj kie ankoraŭ ne ekzistas tiaj servoj.

8.6. Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn.

8.7. Kontroli, zorgi k. atenti la preparlaborojn por la kultura programo de la Festivalo en Camagüey.

8.8. Zorgi pri la kolekto de la mankantaj materialoj por finpretigo kaj eldono de la libro salute al IV-a Kongreso de KEA.

**9. INTERNACIAJ RILATOJ**

9.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI kaj aliaj landaj asocioj, lokaj kluboj, kaj E-institucioj.

9.2. Daŭra kontribuo al evoluo de E-o en Ameriko kaj aktive kunlabori kun la regiona informilo.

**10. FAKA AGADO**

10.1. Atento al interesitoj pri faka agado tutlande.

10.2. Daŭre informi al la membraro pri apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko en kaj eksterlande.

10.3. Kontroli kaj stimuli fakulojn partopreni provincajn renkontiĝojn pri E-o en Scienco kaj Tekniko, cele al la okazigo de la venonta SAEST.

10.4. Flegi la agadon de KEMA.

10.5 Eldoni Teknikan Bultenon.

**11. LIBROSERVO**

11.1. Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la Libroservo.

11.2. Zorgi pri la korekta k. efika funkciado de la libroserva sistemo tutlande.

**12. ATENTO AL ALILANDAJ ESPERANTISTOJ**

12.1. Atento al interesitoj viziti Kubon kaj reagi al tiaspecaj informpetoj.

12.2. Pretigi lokajn esperantistojn ekde informa vidpunkto por atenti alilandajn esperantistojn.

**INTERKONSENTOJ**

1. Elekti S-rojn Pedro Fernández Rodríguez kaj Alberto García Fumero kiel protokolantojn.
2. Aprobi la tagordon.
3. Aprobi la diskutitajn modifojn al la Statutoj de la Asocio.
4. Finpretigi proponon je Regularo kaj ĝin sendi al la komitatanoj en marto 2001.
5. Aprobi la proponon pri nova membrokarto.
6. Aprobi la Estraran Raporton.
7. Krei mekanismon por honorigi la elstarajn forpasintojn.
8. Aprobi la raporton de la Financa Komisiono.
9. Kompletegi la Financan Konisionon per Yoandra Rodríguez.

10. Aprobi la bilancon de la jaro 2000.
11. Aprobi la ĉefajn taskojn de la jaro 2001.
12. Aprobi la buĝeton de la jaro 2000.
13. Aprobi la konisiton de la Elektokomisiono: Alberto García Fumero, Marta Alonso Gutiérrez kaj Rafael Cabrera Espinosa.
14. Aprobi la projekton pri stimulado.
15. Aprobi la proponon pri la Trijara Strategia Laborplano de KEA.
16. Aprobi la aperigon de la Trijara Strategia Laborplano de KEA en la unua numero ĉi-jara de Universo.





Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro